# TEJO-aktuale: numero 64, 2002-06

## TEJO-ESTRARO KUNISDOS EN ROTERDAMO

Inter la 13a kaj la 16a de Junio TEJO-estraro kunsidos en Centra Oficejo en Roterdamo. En la tagordon eniras diskutoj pri strategio de TEJO por la venontaj du jaroj, ghisnuna plenumado de laborplano, demando pri plibonigo de servoj al la membraro, financa stato de TEJO, seminaria kaj kongresa agado.
Informoj che Katja Ignatieva, ghenerala sekretario de TEJO katja.ignatieva@tejo.org

## MALLONGAJ NOVAJHOJ PRI LA MONDO - EN ESPERANTO!

Mallongaj novajhoj pri la mondo - en Esperanto! La nova servo che http://intergazeto.inf.hu/ ebligas ricevi la novajhojn senpage ankau per retposhto au per poshtelefonaj mesaghetoj (SMS). Anoncighu che e-inform@index.hu au telefone +36-1-2173912.
La nova servo helpas uzi la internacian lingvon en la praktiko.

La servon prizorgas: Thierry SALOMON http://abonasoft-esperanto.inf.hu.

Fonto: Ret-info

## NOVAJHOJ DE BUDHANA LIGO

Dum la Universala Kongreso en Fortaleza, Brazilio (la 3a-10a de Augusto, 2002) okazos kunveno dum kiu estas planata refondo de Budhana Ligo Esperantista. Esperantistaj budhistoj/interesighantoj bonvolu kontakti la iniciatinton s-on YAMAGUTI Sin'iti syam-z@wa2.so-net.ne.jp

Plia informo che: http://www13.u-page.so-net.ne.jp/wa2/syam-z/budhismo.indekso.html

## INTERLINGVISTIKAJ STUDOJ EN POZNAN

La Universitato de Adam Mickiewicz (UAM) ekas novan kursaron pri interlingvistiko, internacia komunikado, E-kulturo, E-literaturo. La 3-jaraj studoj okazas en ekstera formo kun unu surloka unusemajna sesio dum la semestro (fine de septembro kaj komence de februaro) en Poznan, Pollando. Alighi al la kursoj eblas ghis la 15a de Augusto. Interesighantoj bv kontakti d-inon Ilona Koutny ikoutny@amu.edu.pl

Esperantic Studies Foundation (ESF) http://www.esperantic.org ofertas stipendiojn por chi-kurso.Interesighantoj devas ghis la 31a de Julio sendi leteron al Mark Fettes mfettes@esperantic.org.En la letero bv priskribu viajn interlingvistikajn interesojn, eblajn esplortemojn, kaj klarigu kiel la kursoj kontribuos al via disvolvigho persona kaj profesia.